Geamikoj, la 1 decembro mi lasas postenon kiel sekretario de SEF, ĉar mi translokiĝas al Västerås. Nia vic-sekretario, Sigvard Håkansson, funkcios kiel sekretario ĝis la jarkunveno. Li estas malnova esperantisto, kiu dum multaj jaroj estis sekretario de la stokholma grupo. Li farigis konata speciale pro multaj teatrajoj en esperanto, kiuji li verkis. Post interludo ĉe la bontemplanoj, kie li ankaŭ propagandis esperanton, li antaŭ kelka tempo revenis al la stokholma grupo, kiun li vigligis kiel prezidento dum la malsano de Sune Ahlm.

Mi estis elektata sekretario en 1940, kaj do mi havis la postenon dum preskaŭ la tuta milito. Estis malfacila tempo por la esperantomovado, kie oni jam antaŭ la milito povis konstati veran malprogreson pro la atendata milito. Dum la milito la plej bona instigilo, la internacia kontakto, plejparte forestis, kaj pro la malkresko de membraro la ekonomio farigis bedaŭrinde malforta. Ni kolektis pli ol 8000 kronojn por la sindika agado, kaj nia sindiko faris sian eblon por teni la nivelon de la movado. Sed ni ne povis samtempe kolekti monon por la federacio, kaj ĉar la membrokotizoj ne sufiĉas ni ofte sentis la mankon de ekonomiaj rimedoj.

En tiaj cirkonstancoj ne estis eble fari grandajn entreprenojn, sed ni devis zorgi pri tio ke ni ne perdu niajn membrojn sed konduku la federacion nedifektita tra la ventegoj, kiuj skuis ankaŭ la esperantistan mondron.

Mi komencis tutlandan registradon de esperantistoj, ĉu ili apartenas al SEF aŭ ne. Tiu laboro nur estas komencita sed iom post iom oni povas ĝin finfari. Por raciigi la oficejan laboron mi akiris modernan stencilaparaton, kiu vere estis bonega helpanto en tempo, kiam estis tiom malfacile laborigi sufiĉe multajn esperantistojn. Kiam mi eniris la estraron la membrokotizo estis 35 oeroj po kvartoj. Tiun ridindan aranĝon ni forigis kaj nun estas jarkotizo de 2 kronoj aŭ kun gazeto 5 kronoj. Mi volis plueniri sur la vojo kaj doni al ĉiu membro de la federacio nian gazeton sed ne rekonis sufiĉan komprenon por tiu ideo. Tamen mi ne ĉesos labori por ĝi. Por registrado de membroj mi kompilis sistemon kun membrokartoj, laŭ kiuj ni ĉiam havas aktualan kartaron pri la membro. Tiu sistemo sufiĉe multe kostis sed ĝi multe helpis al ni. Mi kunigis la federacion kun la pacmovado, la sveda sekcio de Mondunuigo por paco, pensante ke la du movadoj havas tiom komune ke ili povas sin reciproke helpi. Je ĉagreno de kelkaj esperantistoj mi konsekvene enkondukis la metran sistemmon de paperformatoj por la presajoj de la federacio kaj ankaŭ propagandis por ĝi.

Ni ofte devis fari monkolektadon inter la membroj de la federacio, kaj mi supozas ke ili ofte malhatis la ĉiam revenantajn postulojn pri subteno. Tamen mono estas ncessa kaj la membrokotizoj ne sufiĉas. Tial mi proponis novan formon de kolektado, kie la pli bone situataj membroj povas pagi pluan kotizon, nome la garantiantoj, kiuj venontan jaron komencos pagi la garantikotizon de 10 kronoj. La duono iras al la propaganda fondo.

La ideo de Strönne pri programarkivo nun estas realigata, kaj espereble ni per tio helpos al la grupoj estraraj ke ili havos tempon sin okupi ankaŭ pri pli gravaj taskoj ol elpensi programpunktajn por amuzigi la membrojn.

Antaŭ kvar jaroj mi konis preskaŭ nur stokholmajn esperantistojn. Pro la jarkunvenoj kaj cetera federacia laboro mi nun konas samideanojn tra la tuta lando, sed pro la milito mi nur malmulte havis kontakton kun eksterlandanoj. Mi ege gajas nun koni tiom da fervoraj kunlaborantoj en nia lando kaj mi kore dankas al ili pro interesa kaj instrua kunlaboro. Mi ankaŭ humile petas pardonon se mi foje eraris aŭ ne kapablis sufiĉe diligente labori. En la komenco mankis al mi sperto pri la movado kaj mia sano ne estas tiom fortaj ke mi povas labori ankaŭ nokte kiel mia antaŭulo.

Jam en 1943 la membroj denove kreskis post multjara malkreskado. Multaj signoj ankaŭ montras ke la movado diversloke post duondormo vekiĝis kaj komencis agi. Mi havas fortan fidon je la estonto, kvankam mi kredas ke la movado dum ankoraŭ multaj jaroj devos pacience plueniri kaj ke la venkoj ne estos facile atingeblaj. Inter la taskoj kiuj atendas nin tre grava estas restarigo de pli intimaj rilatoj kun IEL kaj fratorganizo speciale en la nordaj kaj baltaj landoj. Ni devas ankaŭ provi mildigi la ardan malamon kontraŭ la malamikoj ĉe la popoloj en okupitaj landoj. Gi estas komprenebla sed neniel promesas pacon por venontaj generacioj. Pri la hejma movado mi forte esperas ke ni iam ricevos veran esperantocentron en Stockholm kun federacio, eldonejo kaj stokholma grupo en la sama domo. Tie ni ankaŭ nepre havu bonan arkivon aŭ muzeon de esperanto. Por efika laboro ankaŭ estas tute necese havi pagitan oficiston kiu prizorgas ekspedan laboron ktp.

La kongreso en Karlskoga ja deklaris ke SEF ĉiam estas preta diskuti kunigón kaj kunlaboron kun aliaj esperantoorganizo kaj nacie kaj internacie. Tio ne estu nur frazo. Estas mia varma deziro ke ĉiuj esperantistoj kunlaboru por la komuna celo.

La interna ideo certe ne ĉie taŭgas kiel propagandilo, gi estas nur mokata de homoj kiuj ne povas ĝin kompreni. Sed inter ni esperantistoj ni sincere konfesu ke tiu ideo estas la sola aŭ almenaŭ ĉefa kaŭzo ke ni oferas horojn kaj jarojn en nia por eksterulo tiom stranga sed tiom alloga movado. Kiam mi lasas la estraron mi tamen ne lasas vian rondon sed daŭrigos sindone labori por nia (mi malofte uzas la vorton) sankta afero!

Salex.

## PROPAGANDAKASSAN (postgiro 2012)

har sedan föregående redovisning fått mottaga följande bidrag: Arne Harnell, Bengtsfors, 5 kr.; ..s And., Esperantujo, 5; Hillevi Zackrisson, Tannefors, 10; Skövde Esperantoklubb 5; E. Falk, Skövde, 5; Axel B. Mandell, Skövde, 2; Stolt, Skövde, 2; Gunnar Ring, Skövde, 2; Norrköpings Esperantoförening 25; från Norrköping följande: Nils Johansson 3; K. Lönngren 3; Ch. Johansson 3; E. Gustafsson 3; Märta Andersson 3; Wivan Kullander 3; J. Pihlström 3; Karin Pettersson 2; C. Carlsson 2; Ragnhild Ahl 2; Edvin Rolf 3; Anders Roos 3, A. Wattsten 2; Margareta Arnroth 2; E. Lindqvist 5; Krylbo Esperantoklubb 40; Karl Bengtsson, Krylbo 10; Medlemmar i Vingåkers Esperantoklubb 5; från Motala; Carl Hallros 2; M. Österberg 2; R. Andersson 2; Sven Uno 2; A. Seger 4; Axel Hellman 2; Motala Esperantoklubb 5; ur Esperantoklubben La Fajrero's klubbkassa, Uddevalla, 5. S:ma 182:—. Tidigare redovisat 784:15.

Avgår felaktigt redovisade 25:—, Harry Nilsson, Malmö. S:ma kr. 941:15.

Vi tacka hjärtligt för bidraget. Det har varit svårt ibland att tyda namnteckningarna på listorna, varför jag ber om överseende ifall några namn eller initialer skulle vara felstavade här.

Birger Germann.

**Der Weg ins Leben** (La vojo en la vivon) estas nomo de stencilita gazeto eldonata de junaj germanaj rifugintoj en Svedio. Nia samideano Rudolf Petri, kiu iam organizis la esperantoparolantajn skoltojn en Germanio sed nun estas en nia lando, estas membro de la redakta komitato por tiu gazeto, kaj li enmetis artikolon pri esperanto. Cetera li bone propagandas esperanton inter siaj germanaj amikoj. La numero 3 cetere enhavas i. a. artikolon, kie oni pledas por centra kartoteko kaj vasta organizo ekzemple sub Ruđa Kruco por retrovado de homoj, kiuj dum la milito estis transportitaj malproksimen. "Cu vi vivas ankoraŭ?" estas la titolo.

Salex.

## Al insulo feliĉula.

Ekbloviĝas multaj ventoj, uraganoj sur la vojo  
al insulo feliĉula de la pacifico infanrodo.

Ondoj ŝaumaj furiozaj kaj minacos la profundo,  
dum sopiras vi je fora prisonata bela grundo.

Eĉ neniam iu venis akompane al la celo.  
Tute sola vi persistu kun la Di kaj via velo!

Tremegante pro la frosto kaj kun man dolore vunda  
direktelon vi tenadu dum vojaĝ tra nokt profunda!

En la foro subakviĝos belmemoroj, verda valo,  
kaj trans nigraj nuboj kašos sin vojmontra idealo.  
Malespero vin plenigas kaj vi larmos pro fatalo,  
vojperdiga drivo mara, malespera vivbatalo.

Sed se restos vi fidela al la ver kaj bone velas,  
iam tamen vi ekvidos matenigon. Kiam helas,  
ĉe la bordo feliĉula vin la ŝvelondado portas  
kaj en noktpremita brusto via koro ree fortas.

Do la sorĉe dormetanta inter rozoj regidino  
revekiĝos kaj renkontos vin sur strando ĉe la fino.  
Plenbukedon de animaj floroj el la paradiz  
Salutante al vi donos ŝi pro venk je ama kis.

H. J. Dahlén.

## PRI MILITKURSO.

Dum militservo en Stockholm julio-aŭgusto 1944 mi per helpo de SEF povis arangi senkostan militkurson en mia tendaro. Kvankam mi nur havis 4 lecionojn pro manko de tempo mi tamen povas diri, ke la kurso el propaganda vidpunkto bone sukcesis. Estis 13 partoprenantoj, kaj ĉiuj kun granda intereso akceptis la instruon en nia lingvo.

Nun la plej multaj denove estas en diversaj lokoj en la lando kaj certe ili almenaŭ ricevis bonan impreson pri esperanto, kaj tiurilate ili estas valoraj por nia movado. Ĉiu militservanta esperantisto povas arangi similajn kursojn kaj tiamaniere interrompi la enuigon de la militservo kaj ankaŭ altiri al la movado pli da simpatiuloj, sed — ĉar vere estas granda sed — mankas io en nia organizo, ni ne havas membrosvoron.

En ĉiu loko ni havu almenaŭ unu membrosvanton, kiu adepto la esperantan infanon kaj konduku ĝin daŭre en la esperantan mondon. Tiamaniere oni povas skribi al la servanto kaj mencii al li ke tiu aŭ tiu nun estas en lia loko kaj ke tiu persono interesigas pri la movado, kaj tiel ni certe povas konservi multajn valorulojn.

Kiel nun estas, multaj de niaj membroj kaj lernantoj perdiĝas pro manko de instigo ĉe translokigo al aliaj lokoj, almenaŭ ni spertis tion ĉe translokigo al Stockholm kaj alioke de multaj fervoraj membroj, pri kiuj ni nun scias, ke ili estas for el Esperantujo.

Helpo, kaj rapida helpo tiurilate estas bezonata.

Vpl. 472 40/24.

## Bliv I.E.L.-medlem.

Under detta krig har IEL-medlemmarnas antal i England kraftigt ökats. I Sverige däremot har minskeningen varit betänktligt stor. Vi svenskar har dock fått leva i fred och borde mer än några andra stödja den internationella esperanto-organisationen. Vi vävdja nu till de svenska esperantisterna att bli aktiva medlemmar i I. E. L. genom att beställa årsboken (2 delar, pris 3 kr.) eller årsbok jämte tidning (f. n. världens enda internationella esperantotidning, pris 8 kr.) Alla hoppas ju på fred nästa år och då bör Sveriges esperantister visa sin solidaritet. På de platser, där esperanto-delegito de I. E. L. saknas, bör sådan utses. Tillskriv Cefdel. Karl Wästfelt. Se adr. å tidingens sista sida!

# Åter en nyhet FRÅN FÖRLAGET.

**Hans Christian Andersen — liaj vivo kaj verko.** Esperanta originalo de Chr. Heilskov. Pris 2 kr. (plus oms. och porto) hos Förlagsföreningen Esperanto, Fack 698, Sthlm 1. (Postgiro 578.)

Det torde väl icke finnas någon svensk, som icke lyster till namnet Hans Christian Andersen. Den store danske poeten och sagoförtäljaren har i vårt land, liksom all världen över i övrigt, funnit den beundran, som hans förtjusande konst är värd. Men när vi ha läst och njutit av hans fabler, ha vi kanske inte ägnat mången tanke åt mannen bakom verket, åt hans strävanden, hans misslyckanden och motgångar innan han nådde målet. Därför är det med stort intresse man tar del av den uttömmande skildringen av Andersens barndom och uppväxtår samt hans ojämna kamp mot ett oftast ogynnsamt öde och ett länge återhållet erkännande, som vår danske meningsfrände, bibliotekarien Chr. Heilskov, utarbetat i original på esperanto.

Det är ingen tröttande läsning som här erbjudes. Tvärtom fångas man av den levande skildringen, och man noterar tacksamt efter genomläsandet, att man fått reda på en hel del, varom man förut intet vetat. Christian Andersen, som förut nästan synts oss synonym med de sagans figurer han skapat, har plötsligt blivit en varelse av kött och blod.

Verket har utan vår vetskap funnits till redan sedan krigets början, och först nu och av en ren händelse ha vi fått reda på dess existens och lyckats skaffa ett 50-tal exemplar. Vi tro att de komma att finna förtjusta köpare omedelbart. Här som alltid gäller: den som kommer först . . .

BEN.

## Svisa Antologio.

Som vi förmadade, tog den lilla upplagan av Svisa Antologio snabbt slut. En del av dem som beställt boken ha ej kunnat erhålla den. Vi ha en liten men svag förhoppning om att kunna få en del ex. ytterligare från Schweiz, varför vi föreslå dem, som insänt likvid men ej fått boken, att avvakta någon tid.

## Utländska nycklar.

Den starka flyktingströmmen har orsakat stark efterfrågan på bl. a. finska och estniska nycklar. Bägge ha varit utsålda från förlaget nu en tid. Vi ha emellertid lyckats få ett mindre antal av finska nycklarna på nytt, var emot estländska nycklar visat sig omöjliga att skaffa.

Ävenså är en stor del av övriga länders nycklar utgångna och ha ej stått att förnya. En del finnes dock fortfarande: albana, araba, bulgara, flandra, hungara, islanda, itala, juda, kroata, latva, malaja, norvega, portugala, romanica, slovaka, slovena, ukraina. En samling av dessa nycklar är en nöjsam sak att ha i sina esperantorekvista.

## Sådant gläder.

Vi ha mottagit följande:

"Undertecknad, som för cirka 14 dagar sedan bekom "Hasse Z-boken", vilken jag nu studerar för andra — men säkerligen icke sista gången — kan icke underlåta att gratulera Förlagsföreningen för utgivandet av denna utmärkta bok, och översättaren är värd allt beröm för den utomordentligt gjorda översättningen.

Jag tror för min del att utgivandet av dylika lättlästa och roliga böcker skulle betydligt sporra intresset för esperanto, då folk i allmänhet icke har lust att fördjupa sig i alltför seriösa och svårlästa verk.

Alltså ett hjärtligt tack för en trevlig bok.

Med utmärkt högakning  
Carl E. Palm  
Kriminalkommissarie.

# SVEDA KRONIKO

## DALEKARLIA ESPERANTO-DISTRIKTO JUBILEAS.

Dimanče la 8-an de oktober trideko da geesperantistoj el diversaj lokoj renkontigis en la urbodomo de Borlänge por solenigi la 20-jaran jubileon de la dalekarlia esperantodistrikto. La distrikta prezidanto, Karl Bengtsson el Krylbo, salutis ĉiujn alvenintojn kaj speciale bonvenigis la invititan festparolanton de la kunveno, fil. lic. Karl Söderberg el Upsala, kaj la iaman unuan prezidanton de la distrikto, nian ŝatatan estron de la Eldona Societo, s-ro Bernhard Eriksson, kiu ankaŭ alvenis el Stockholm.

En sia festparolado s-ro Söderberg i. a. rakontis pri la granda interproksimigo de la diversaj landoj dum la intermilita periodo, kiun kaŭzis la ĉiam pli floranta scienco kaj tekniko. Tiu periodo estis ja ankaŭ la tempo de internaciaj kongresoj. Sed ia vera interproksimigo de la diversaj popoloj apenaŭ estis ebla per tiuj kongresoj pro la terura multlingveco, kiu regis ilin. Alia afero, se oni komparas tiujn multlingvajn konferencojn kun la mond-kongresoj de la esperantistoj. La parolanto poste tre interese daŭrigis sian paroladon donante rapidajn sed allogajn kaj belajn transrigardojn pri granda aro de la universalaj esperantokongresoj. Fine li diris kelkajn vortojn pri la planita postmilita mondkongreso de Malmö, gratulis la dalekarlian distrikton kaj kun bondeziroj al bona daŭrigo laste elvokigis por ĝi kaj la tuta esperantomovado kvaropan horaon.

S-ano Gustav Johansson el Falun poste rakontis pri la unua pionira esperantolaboro en Dalekarlio kaj iom pri la antaŭlaboro por la distrikta fondigo. Salutoj de estonaj samideanoj-rifugintoj en Karlskrona kaj Upsala estis transdonataj de s-ro Engholm kaj Söderberg. S-ro Eriksson diris kelkajn vortojn pri la 20-jarulo, kaj nia jungermano gasto, s-ro Rudolf Petri, vigle rakontis pri siaj esperantospertoj kaj promesis ke post nelonge li certe reveturos al sia lando por tie daŭrige sian laboron por esperanto. Post komuna kantado de la esperantohimno kaj kelkaj dankvortoj de la distrikta prezidanto la jubilea kunveno estis finita.

M.J.

## STUDKONFERENCO EN KARLSTAD.

Dimanče la 8an de okt. la "unuigintaj" esperantogrupoj de Värmland—Dal kolektigis al studkonferenco en K.F.U.M, Karlstad. Tre granda nombro da delegitoj kaj unuopaj esperantistoj atentis la inviton al la konferenco, kiun dissendis la Esperanto-Societo de Karlstad kaj la Distrikto de SLEA. Lastatempe oni en diversaj artikoloj plendis pro tio, ke oni ne parolas esperante dum kongresoj kaj konferencoj, sed koncerne ĉi tiun konferencon oni ne rajtas plendi, ĉar jam de la salutparolo ĝis la fino de la unua parto de la konferenco la lingvo estis esperanta,

La prez. de la klubo en Karlstad, instr. G. R. Johansson, malfermis la konferencon kaj konigis la ampleksan programon. Sekvis poste rapportoj de la gruprepräsentantoj, kiuj ĝenerale atestis pri optimismo koncerne la estontan laboron por la lingvo. La plej favoran reporton venis de Karlskoga, kie oni arangos plurajn kursojn por komencantoj. Ankaŭ en la aliaj lokoj la grupoj faras la plej bonon por disvastigi la lingvon kun pli malpli bona sukceso. S-ro Bonander el Karlskoga ankaŭ faris reklamon por la venonta kongreso de SEF. Reklamon por la Feriokursoj en Dals Långed faris la prez. de la distrikto de SLEA s-ro Greger Andersson, kun bona helpo de la "humoristo" E. Pettersson el Malmö, kiu ne timas longdistancajn vojagojn por ĉeesti esperantistajn renkontigojn. Jam dufoje li nun ĉeestis la kursojn en Dals-Långed, sed ankoraŭ ne kontentiĝis, sed intencas reveni plurfoje.. ĉu ne bona atesto por la kursoj? Post la pritraktoj la Esp.-Societo de Karlstad invititis kaj regalis nin ĉiujn al kaf-festo kaj tablokantado.

Post la kafpaŭzo estis tempo komenci la duan parton de la konferenco, al kiu oni invititis reprezentantojn el diversaj idealistaj societoj por diskuti la taŭgecon de Esperanto kaj la eblecojn disvastigi la lingvon. La prez. de la distrikto bonvensalutis la alvenintajn gastojn kaj dankis pro la emo subteni la esp.-laboron, kiun montris ĝis nun

la distr. de Paperlaborista Sindiko. Li esprimis la deziron, ke la nun alvenintaj reprezentantoj ĉiu en sia societo subtenu nian agadon. Instruisto Johansson donis interesajn kaj klarajn informojn pri la pozicio, kiun Esperanto havas nuntempe. Pruvon pri la praktika utilo de la lingvo donis instr. Nils R. Anderwall el N. Råda, kiu paroladis pri sia vojaĝo al la mondokongreso en Varsjawa 1937. Montriĝis dum tiu vojaĝo la supereco de scio en esperanto kompare al scio de la angla lingvo. Li ilustris sian paroladon per granda nombro da bildo de tiu vojaĝo. Interesa parolado, kiu certe faris bonan impreson al la ĉeestantoj neesperantistaj kaj ĉe la esperantistoj vekis la emon entrepreni similan kongresvizon.

En konekso kun tiu bildmontrado sekvis serio da belegaj kolorbildoj de la kurso en Dals Långed kaj de la kongreso en Karlskoga. Sur unu el tiuj ni rekonis la mortintan pioniron Carl Winberg. Honore al li la ĉeestantoj starigis kaj instr. Johansson memorigis pri la sindona laboro, kiu Winberg dediĉis al la esperantomovado.

Antaŭ la finigo de la konferenco oni faris la decidon sendi peton al Radioservo pri enkonduko de Esperanto en ties programon. Jen finis tre sukcesa konferenco, kiu certe instigos la ĉeestantojn al novaj klopodoj por antaŭenigi kaj plifortigi la provinca esperantomovadon. E.H.

**SOLLEFTEA.** "La Espero". Dum la somero ne estis regula laboro. Dum septembro kelkaj klubanoj kolektiĝis al studado, do ia daŭriga rondo, kun la prezidanto kiel gvidanto. Ni preparas komencantan kurson, sed estas malfacile ekhavi konvenan ejon por la kurso.

**VIMMERBY** Esperanto Klubo jam printempe dum la jarkunveno diskutis pri esperanta kurso por komencantoj. Post korespondado inter la klubo kaj ABF en du proksimaj lokoj la planoj realigis tiel, ke en oktobro d-ro Szilágyi faris provlecion en Vimmerby, Hultsfred kaj Kisa. La saman vesperon, kiam okazis la provlecion en Vimmerby, la tuta urbeto ĉe la stacidomo akceptis ĉ. 300 estonajn rifugintojn, kiuj logis en la popollernejo, kie la eventuala kurso kunvenos. La ĉefa gazeto, kiu promesis bonan serion de propagandaj artikoloj, aperigis, laŭdire pro la foresto de la redaktoro, eĉ ne unu vorton krom la anonco, kiu estas pli granda ol interkonsentite. Do, kiam d-ro Szilágyi alvenis, ŝajnis al ni, ke mankos kaj partoprenantoj kaj kursejo. D-ro S. kaj la kluba prezidanto persone honorvizitis la jus hejmenvenintan redaktoron, kiu la saman tagon aperigis artikoleton kun bildo. Malgraŭ ĉia neantaŭvidebla malbono la provlecion estis sukcesa kaj kurso povis komenci. Nova venko por la smolandia obstino! Nun ankaŭ komencis infankurso. Kune estas ĉ. 40 viglaj partoprenantoj, kiuj videble havas grandan plezuron je la nova instrumetodo. Versajne estos kurso ankaŭ en Kisa kun loka gvidanto. D-ro Szilágyi faros prelegojn pri Hungarujo en diversaj urboj.

La klubo havas loterion. La gajno, kiu valoras 100 kr., estas tre bela pentraĵo de la fama artistino Rigmor Svenoni. Ciu loto kostas nur 1 kr. Mendu lotojn pagante sumon al O. Olsson. (Postgiro nro 163607.)

29-jara estona studento el Dorpata Universitato deziras korespondi kun svedo. Peeter Kütt, Flyktinglägret, Vandrarhemmet, Vadstena.

#### KORESPONDADO.

Asekuradistoj. Fondinto de fakgrupo por asekurado en Svislando serĉas koresp. kun fakuloj (fakgrupoj) en alia lando. Werner Laederach, Küngenmatt 31, Zürich 3, Schweiz.

#### NOVA ADRESO:

Bernh. Lavén, Skantzgatan 10 B, ÖREBRO.

#### Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fägelfängaregatan 20

Göteborg V  
Postgiro 314 30

## Svenska Esperanto-Tidningen La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannon: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98. Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje anslutna förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO** u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 10 53 27). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL** (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Postcäka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

## "Latinets arvtagare"

har blivit det förkortade, populära namnet på den lika populära lilla propagandaskriften

Esperanto — latinets arvtagare

— nationalspråkens jämlike

av professor Björn Collinder  
läroverksadj. John Stenström

Dess stora propagandavärde och synnerligen lättillgängliga innehåll har gjort den till ett värdefullt dokument i esperantorörelsens strävan att vinna erkännande.

Vilket värde skulle det inte ha, om varje esperantist rekvirerade ett ex. och sände det till någon icke-esperantist!

Vi skola t.o.m. spara eder besväret med att själv skicka honom det — vi göra det gärna — genom att ni sänder oss 1 kr. pr postgiro (578) eller i frimärken jämt adress på den ni vill uppvisa med ett ex.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,**  
Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

## För kurser och självstudier.

|  |      |
|--|------|
| Systematisk kurs i esperanto (Seppik—Malmgren) | 1:—  |
| Kurs i Esperanto (Fritz Lindén)                | 0:90 |
| Dr Szilágyis kurs i esperanto                  | 2:—  |
| Praktisk lärobok i esperanto (Jansson)         | 2:—  |

#### ORDBÖCKER

|                               |      |      |
|-------------------------------|------|------|
| Svensk-Esperantisk Ordbok     | inb. | 7:50 |
| Esperantisk-svensk ordbok     | inb. | 5:—  |
| Dubbel Fickordbok i Esperanto |      | 2:50 |
| Esperanto-Parlör              |      | 0:75 |

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,**  
Fack 698, Stockholm 1.